MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN VLAAMSE ESPERANTO-BOND

JARKOLEKTO
JAARGANG 2 N° 7 NOV. 1982

# Informilo

VERANTW. UITGEVER
RESPONDECA ELDONANTO JAN BOVENDEERD, SPEELTUINLAAN 14, B-2510 MORTSEL

I N F O R M I L O — Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTO-LIGO
Aperas ĉiumonate, krom en julio kaj aŭgusto
Abono : BF 150,-

---

FLANDRA ESPERANTO-LIGO — Frankrijklei 140,2000 ANTWERPEN - 03/234 34 00
Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43

E S T R A R O

Edw. SYMOENS, Putsesteenweg 131 A
2180 KALMTHOUT 03/666 62 66
prezidanto/Informado, Planado/Agado

Roger DE SCHEPPER, Doornstraat 22
2610 WILRIJK 03/827 24 40
vic-prezidanto/interna revizoro/buĝetoj

Jules VERSTRAETEN, St. Bernardsesteenweg 1078
2710 HOBOKEN 03/827 66 43
estrarano pri financoj

Jan BOVENDEERD, Speelhuinlaan 14
2510 MORTSEL 03/449 50 06
sekretario/kunordigado

Paul PEERAERTS, Kloosterstraat 35
2000 ANTWERPEN
direktoro de GCA/ librotenado

Kristin TYTGAT, St. Hatebrandstraat 8
2510 MORTSEL 03/449 50 24
reprezentanto FLEJA

K O M I S I I T O J

Hilde VANINGELGEM, Arbeidstraat 21, 9300 AALST

Trees DOOMS, Knaptandstraat 36, 2700 St. NIKLAAS
intergrupa agado

André STAES, Jan Denucéstraat 1/198 2000 ANTWERPEN
kadrokursoj

Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2 2000 ANTWERPEN
literaturaj, tradukaj, eldonaj aferoj

Annie BOLLAERTS, Zomerlaan 16, 1500 HALLE

Herman DECEUNINCK, Floralaan 21, 1510 HALLE-BUIZINGEN
gazetara servo

Ivo DURWAEL, P. Gilsonlaan 5, 2520 EDEGEM
volontula servo

FAKAJ KUNLABORANTOJ

Wim DE SMET, Hertendreef 33, 2180 KALMTHOUT
sciencoj

Willy HUYBRECHTS, Rozendreef 33, 2180 KELMTHOUT
komputeraj aferoj

---



Ĉu vi ne forgesos ........ ? .......

LA VENONTA KADROKRUSOTAGO KIU OKAZOS SABATON 27-AN DE NOVEMBRO EN NIA KUTIMA EJO : ESPERANTO-DOMO EN ANTVERPENO ?

TEMO : LITERATURO
GVIDONTO : CHRISTIAN DECELRCK
KOMENCO : DE LA EKZAMENETO, POR TIUJ KIUJ VENOS UNUAFOJE : 09.00 H.
DE LA KURSO : 10.00 H.

---------

Ne forgesu ankaŭ la STUDOTAGON, pri kiu vi povos legi en la ĉikuna protokolo sub numero 2.

Temas pri unua paŝo kadre de la ĝenerala agadplano UEA/FEL, pri kiu ankaŭ temas en la protokolo kaj kiu rilatas al la preparlaboro al la centjariĝo de Esperanto en 1987.

La temo de la studotago estas argumentado kaj kontraŭ-argumentado de la (jes aŭ ne) gazetara servo, sub gvidado de Petro De Smedt.

Ĝi okazos en Esperanto-Domo, Frankrijklei 140, Antverpeno je sabato 4-a de decembro 1982 de 14.00 ĝis proksimume 20.00 h.

Ni ne mistaksu la gravecon de tiu studotago. La celo estas ne perdi sian tempon en senfina diskutado, sed bone preparite, kiel eble plej kondense, tamen ĝisfunde, priesplori niajn defens-eblecojn kontraŭ ĉiuj atakoj de ekstere; priesplori kaj kunmeti plej taŭgan strategion por la estonto.

Interesitoj estas kompreneble plej bonvenaj.

---------

F L E J A - LICHTAART

Kiel pasintan jaron, FEL-estraro organizis estrarkunsidon kadre de la Internacia Junular-Renkontiĝo.

La etoso estis ege agrable vigla, kortuŝe juneca, kuraĝiga.

La programo estis ege ŝarĝita, sed ni certas ke neniu plendis pri tro da okupado, tro da aktiveco. Ĉiu ja restis libera !

Je nia bedaŭro, ni ankoraŭ ne ricevis raportadon, tiel ke ni devas prokrasti tiun ĉi ĉapitron al venonta numero.

Temo daŭrigota, do.

MORTSEL

ESPERANTO MORTSEL anoncas sian ĉijaran ZAMENHOF-festadon je sabato 11-a de decembro en sia kutima kunvenejo HOF VAN RIETH, Molenlei 68, Mortsel.

Tiu ĉi festeto fakte estas la pludaŭrigo de tiu de LA VERDA STELO en Antverpeno, kiu okazos vendredon 10-an de decembro en formo de INTERNACIA VESPERO.

Por tiuj kiuj ankoraŭ ne scias, Esperanto Mortsel, kiu sin konsideras subgrupo de LA VERDA STELO, malfermas la vojon al tiuj amikoj, kiuj ne povas veni al vendredaj programoj en Antverpeno kaj kreas la eblecon havi la necesajn Esperantajn kontaktojn dimanĉmatene en Mortsel.

Kiel en LA VERDA STELO, ĉiu - kompreneble ! - bonvenas !

--------

LIMBURGO - HASSELT

Ekde la 13-a de oktobro 1982, ESPERANTO HASSELT estas oficiale akceptita kiel membro de la "Konsilaro de la urbo Hasselt".

Niaj Limburgaj amikoj sendis artikelon al 11 gazetojn kaj revuojn, sed tro-vis ĝin nur en "Het Nieuwsblad".

Amiko Claesen ankaŭ komunikis, ke en la Komunuma Biblioteko de Genk, troviĝas, krom diversaj aliaj libroj (vidu en antaŭaj numeroj de nia bulteno), la bone konata INTERNACIA KOMERCA EKONOMIKA VORTARO EN 9 LINGVOJ sub la numero : LZ-374.

---------

NAMUR

"L'école primaire N.D.- de la Paix" en ERPENT, Namur proponis ĉi tiun jaron al la lernantoj de la 5-a jaro, pedagogian eksperimenton tre originalan : Esperantokurson.

La iniciato tre akceptiĝis, ĉar 40 el la 98 lernantoj entuziasme eklernis la internacian ligvon. Estis necese eĉ krei du apartajn grupojn, unu por-merkrede, alia por-vendrede.

Jen plia pruvo ke la junuloj pli kaj pli interesiĝas al efika komunikilo inter la diversaj popoloj.

Bravo Namuro !

# PROTOKOLO

PRI LA ESTRARKUSNIDO DE SABATO 30-A DE OKTOBRO 1982 EN LICHTAART

Ĉeestas : Edward SYMOENS (ES), Roger DE SCHEPPER (RDS), Jules VERSTRAETEN (JV), Petro DESMEDT (PDS) antaŭtagmeze, Jan BOVENDEERD (JB), Paul PEERAERTS (PP) posttagmeze kaj Hilde VAN INGELGEM (HVI) posttagmeze.

Komenco : 10.10 h.

T A G O R D O

1. AGADPLANO UEA/FEL (ES)

1.1. UEA

1.1.1. ES sendis sian laborplanon al 100-o da personoj dise tra la mondo. Li ricevis 40-o da respondoj el kiuj unu negativa (de S-ro Woessink, NL) Flanke de la UEA-estraranoj, li ricevis tri reagojn.

1.1.2. Ekde la 66-a UK en Stokholmo, ES partoprenas la UEA-komisionon pri Informado. Tiu ĉi kunvenis en oktobro.

1.1.3. Aliflanke UEA organizis seminariojn pri Informado, unua en Rotterdam, dua en Bad Sarov (GDR) kaj tria denove en Rotterdam.

1.1.4. El tiuj seminarioj rezultis jenaj rekomendoj:

1.1.4.1. Oficialigi la konkludojn faritajn en la komisiono pri Informado

1.1.4.2. Kunordigi tiujn konkludojn en unu klara dokumento

1.1.4.3. Krei strukturojn

1.1.4.4. Komisii po unu respondeculo por ĉiu ero de la plano

1.1.4.5. Prezenti definitivan laborplanon en la 68-a UK en Budapeŝto

1.1.5.1. Je 30 09 1982 ES sendis al Ursula GRATTAPAGLIA (komisionestro) la rekomendojn por konfirmo. Li ankoraŭ ne ricevis respondon.

1.2. FEL

1.2.1. ES opinias ke la estraro ne povas agi, sed ke ni devos trovi personojn por realigi la planon.
La Centra Oficejo siaflanke, estante administra centro, ankaŭ ne povas partopreni en la plano mem.

1.2.2. Se UEA preterlasas ekagi, tiam FEL tion faru.

1.2.3. Laŭ ES ni devas informi sisteme tutajn sektorojn, tiel vertikale, kiel horizontale.
Ekzemple en la edukaj medioj la ministron, kabineton, inspektorojn, komisionanojn (parlamento), urbajn skabenojn, asociojn gepatrajn, sindikatajn, universitatajn ktp.

1.2.4. Ni komencu tie, kie la afero eblas laŭ sektoroj kaj ne atendu ĝis kiam ni trovis ĉiujn necesajn respondeculojn. Ni ekagu kun tiuj, kiuj pretas.

1.2.5. Ni povos jam komenci en la edukado kaj la amaskomunikado.

1.2.5.1. Gazetara servo :

Tiu ĉi ekfunkciis jam por la junulara renkontiĝo en Lichtaart.
Annie Bollaert kaj Herman Deceuninck bonege laboras. Ili daŭrigos.

1.2.5.2. Necesas ankaŭ, krom la "komunika servo", rebatservo.
ES opinias ke ni devas kunmeti iaspecan regularon por la rebatservo, eble organizi'apartan studotagon, nur rilate al tio.

2. Studotago

2.1. Proponiĝas realigi la ideon sub 1.2.5.2.

dato : 04 12 1982
loko : ESPERANTO-DOMO en Antverpeno
temo : rebatservo - argumentado
kontraŭ-argumentado
gvidonto : Petro DE SMEDT

2.2. JB estas komisiita inviti kelkajn kompetentajn aktivulojn kunlabori kaj peti al ili jam ensendi - antaŭ 20 11 1982 - siajn eventualajn ideojn, sugestojn ktp. por ebligi dissendadon antaŭ la kunveno por esti pli bone preparita.

2.3. PDS siaflanke kontaktiĝos kun kelkaj spertuloj, cele al rekta kunlaboro en la studotaga programo.

12.30 h. p a ŭ z o

14.00 h. d u a p a r t o

3. FINANCOJ

3.1.1. Sekvas detala trastudo de la situacio kaj buĝeto.

3.1.2. Elmontriĝas ke :

3.1.2.1. la administrado kaj la domo foruzas + 60 % de niaj financaj [illegible]edoj, dum antaŭvidiĝas ke la AVI (BTW) altiĝos je 2 %, de 17 al 19 %, kio signifas 2% pli da perdo el la kotizoj.

3.1.2.2. La deponoj sumiĝas je + 600.000 F.

3.1.3. Vere altrudiĝas : malpliigi la kostojn, certe la afranko ;
ekvilibrigi la kontojn, restante en la limoj de la buĝeto.

3.2. Rimarkoj - proponoj de la Interna Revizoro (RDS)

3.2.1. Administrado de la stoko de niaj eldonaĵoj (libroj, broŝuroj, kursoj) estu farita komputile.
Dokumento estu kreita (fakturo, porforma fakturo, interna dokumento) kiam eldonaĵoj forlasas la stokon ĉu por vendo, depono aŭ donaco.



La Centro eldonu regule (ekz. kvaronjare) komputilan raporton pri la evoluo : vendokvanto, donacokvanto, restanta stoko.

3.2.2. Membronombro :
La centro eldonu regule (ekz. kvaronjare) komputilan raporton pri la membronombro (totalan kaj laŭgrupan)

3.2.2.bis - pri ambaŭ raportoj RDS insistas pri reguleco. Ili aperu eĉ kiam ne estus ia ŝanĝo por ke tio iĝu rutina tasko.

3.2.3. Fiancaj raportoj
La interna revizoro kaj la kasisto (eble aliaj estraranoj) ricevu ĉiumonate la superrigardon de ĉiuj kontoj. Do ne nur kiam ili petas tio
Almenaŭ la interna revizoro ricevu kvaronjare kopion de la detaloj de la en- kaj elspezoj.

3.2.4. Pruntoj
Pri pruntoj (donitaj aŭ prenitaj) decidu nur la estraro, ne estrarano, nek direktoro de la centro.
Pri deponoj ni jam decidis. Tamen ni fiksu limon. Kiam depono estas pli granda ol la decidita limsumo, la estraro decidu ĉu jes aŭ ne akcepti ĝin.

PP raportas ke okazas, ke iu kiu laboras en la centro ne plu havas mono pro prokrasto de la pago flanke de la senlaborula kaso. Tiam li helpas.
Decidiĝas jene : La direktoro de la centro ne rajtas pruntedoni monon, krom al oficisto kiu laboras en la centro kaj ĝis F 10.000,- por maksimume unu monato.

3.2.5. Donacoj por eldonado:
La donacoj por 1981 estis uzitaj. Ili ne reperas en la kontoj de 1982.
La donacoj dum 1982 povas esti konsiderataj kiel foruzitaj en 1982.
Ĉu ne rezervi parton el la vendoj por kovri estontajn eldonojn ?

Decidiĝas krei eldon-fonduson kaj rezervigi al ĝi 10 % el la vendocifero de niaj eldonaĵoj.

3.2.6. Buĝeto kaj kotizoj
Estonte ni devus publikigi la buĝetproponon kaj kotizproponon antaŭ la oktobra ĝenerala kunsido.
Tial la koncernaj estraranoj kaj direktoro de GCA havigu al la respondeculo por la buĝetpreparo siajn kontribuojn en la junia estrarkunsido.
Ĝi estu pritraktita en la unua estrarkunsido post la ferioj.

Decidiĝas ekde venonta jaro okazigi la ĉiumonatajn estrarkunsidojn la 1-an sabaton de la monato, dum la ĝeneralaj kunsidoj okazu la 3-an sabaton de oktobro kaj marto.
JB ellaboros detalan laborplanon por la venonta kunsido.

3.2.7. Pri transpago de kotizoj kaj abonkotizoj

Dum 81/82 okazis plurajn malfruiĝojn de transpago de ricevitaj kotizoj al la koncernaj instancoj. Tiu mono ne estas posedaĵo de FEL kaj devus fakte esti tuj transpagita.
Ni fiksu instrukciojn kiel ĝi devas esti traktita en la centro kaj ni ne forgesu ke abono aŭ membreco nur komenc-iĝas kiam la koncerna instanco aŭ peranto (depende de la kontrakto) ricevis la kotizon.

PP respondas al tio, ke se malfruiĝo estas, tio povas okazi nur pro tiumomenta manko de mono. Pagoj estas faritaj tutantaŭe al tiuj instancoj kiuj ne apartenas al la "familio", por eviti malagrablaĵojn de ekster la movado.

4. Perado de revuoj

Kiel aperis jam en la antaŭa protokolo, FEL peras HEROLDO DE ESPERANTO kaj MONATO, sed sen makleraĵo. Decidiĝis tiam repripensi la aferon kaj eventuale interveni ĉe la koncernaj respondeculoj.
Tamen , por eviti komplikaĵojn kaj eventualan devon alkalkuli AVI-on (BTW), PP proponas :
- rilate al MONATO, rekte pagi al MONATO, kiel mono ricevita nome de ...
- rilate al HEROLDO, pasi tra SONORILO kiel antaŭe.

5. Propagandmaterialo

PP anoncas ke la stoko de nia propagandmaterialo proksimume foruziĝis. Kion fari ? Ĉu represi niajn informbultenojn aŭ ĉu aĉeti novajn ?
ES proponas prepari novan tekston, por resti aktuala, kaj reprikonsideri la aferon post kelkaj monatoj. Tio eblas, ĉar restas ja ankoraŭ malgranda stoko.

Aprobite.

Fino 17.10 h.

JB

--------------------



DISKUTANGULO

IDE-KESTO

SUGEST-EJO

?

---

Ĝis nun ni havis en nia bulteno "DISKUTANGULON", kiu jes iasence funkciis, sed fakte nur responde al ideoj lanĉitaj de ni mem.

Tamen, pripensante la aferon, kial ne klopodi malfermi la vojon al ideoj personaj de kiu ajn inter ni ? Kial ne permesi al ĉiu kiu volas proponi siajn proprajn sugestojn kaj ideojn rilate al ... kio ajn ?, kompreneble laŭeble ĉefe pri la movado kaj nia agado. Aŭ kritikojn. Kial ne ?

Ĉu ne estus agrable publiki la opinion de ĉiu interesito persone aŭ eĉ speŭdonime,kial ne ?, kondiĉe kompreneble ke almenaŭ la redaktoro konu la ensendinton.

Jen propono kaj ...

unua provo ...

------------

L A  M O V A D O  K A J  N I

---

Kiam en 1980, nia samlandano Gregoire MAERTENS elektiĝis prezidanto de UEA, li jam tuj akcentigis ke, en la sino de UEA oni ĝis tiam ĉefe okupiĝis pri la interna strukturo, la interna organizado de la movado, ke oni ne sufiĉe eksterigis la movadon, ne sufiĉe atentis pri la ekstera flanko.

Li lanĉis la sloganon : "EKSTEREN !" kaj efektive, la ĝenerala sinteno ŝanĝiĝis favore al lia ideo, la agado direktiĝis eksteren. Sukcese, ni diru, vere ...,sed ...

prikonsiderante la aferon de interne, ĉu ni ne devas konstati ke ni fakte falis de unu ekstremo en alian ?

Ho Dio, ke mi eraru !!!

Nun nia tuta atento estas direktita eksteren. Niaj programoj lasas lokon nur al ekstera agado. La agado celas nur la eksteron...

... kaj dume, la interna movado perdiĝas en la tuto, la membroj estas forgesitaj, ne plu konsiderataj. La membronombro stagnas. Novaj membroj ne membriĝas. Ni kontentas pri la alveno de novaj lernantoj kaj poste ...

Ĉu tio plibonas ? Permesu al mi dubi, forte dubi !

UEA organizis diversajn seminariojn rilate al Informado kaj eĉ fiksis sufiĉe ampleksan programon.UEA volas labori amase, tutmonde, samtempe sur ĉiuj eblaj interesokampoj , tiel vertikale kiel horizotnale, komplete, do.

Ni en FEL kunlaboras en tiu plano, pli eĉ, nia prezidanto akceptis respondecon en la tiurilata komisiono. Ni organizis/as/os studotagojn, kadrokursojn por esplori kiel plej bone sukcesigi la planojn. Ni laboras, penas ... eksteren ... !

Ni sukcesis, havis la ŝancon povi profiti de la ĉi jara universala kongreso por altiri homojn al niaj kursoj, rapidkursoj kaj aliaj kaj ni sukcesis, jes ni sukcesis. Venis homoj. Ili lernis kaj ... forrestas... Vere, kiom da i ni revidis depost la kongreso ? Kiom da ili aliĝis al la movado ? Kiom la membronombro kreskis ?

Ĉu tio ne gravas ? Ĉu vere sufiĉas konvinki la homojn lerni la lingvon sen pli ? Kial, do, ni mem daŭrigas la penadon ? Ni ja jam lernis la lingvon ?

Ne amikoj, ne !

Resendu ni la pilkon al UEA kaj al ĝia prezidanto. Ne bonas centrigi nian tutan atenton nur al la ekstero. Ne bonas forgesi nian membraron, nian lokan movadon. Ni bezonas ilin. Ni nepre bezonas ĉiu el niaj membroj. Ne forgesu ilin !

Ni mem, en la lokaj grupoj penas, ne nur por kapti la homojn, sed por ilin integrigi en la movadon. Tio ne estas "quantité négligeable", tute ne.

Ĉu tio estas afero de la grupoj ? Certe, sed kiu respondecas pri la grupoj ? Ĉu ne la Landaj Asocioj ? Certe, sed kiu respondecas pri la Landaj Asocioj ? Ĉu ne UEA ?

Finfine, la grupoj, la membroj estas la bazo sur kiu ripozas la tuta movad Sen tiu bazo UEA ne havas ekzist-eblecon. Do, ne konsideru la bazon "quan négligeable".

Tio, kion mi volas diri estas ke kiam iu - ĉu individue, ĉu grupe, ĉu LA-e, havas ion por oferi, kiam iu pretas labori eventuale kadre de la GRANDA agado, sed ĉe la bazo, ĉu ni rajtas neglekti tiun ?

Kiel eblas ke ekzemple ESPERANTO, L A revuo de la movado neniam aŭ preskaŭ atentas la bazon (krom se temas pir personaj spertoj de la redaktoro), ne kuraĝigas apud-la-pordulojn-kiuj-daŭre-penadas ?

Nia (kaj se mi diras nia, mi celas la movadajn respondeculojn), nia respondeco estas zorgi ke la grupaj respondeculoj eklernu kiel, ne nur altiri homojn al niaj kursoj, sed ankaŭ al la movado kaj sukcesu ke ili restu.



Jam estas ofte dirite kaj ripetite, ke instrui nur la lingvon sen ankaŭ ĝian uzon kaj sen krei la eblecon je praktika aplikado, ne havas sencon. La zorgo de la grupestroj, do, ne estas nur organizi kursojn, sed ĉefe kaj daŭre interesigi la membrojn al grupaj kunvenoj, unu el la nuraj eblecoj al praktika aplikado.

Tamen, kaj ĉiu konsentos kun mi, interesigi homojn al klub-kunvenoj implicas kunmeti interesajn programojn. Klubo devas esti kunvenebleco por samideanoj. Samideano N E signifas nur samlingvano, kiel erare opinias multaj esperantistoj. Ĉiu, kiu lernis la lingvon ne estas perdifine samideano. Ĉiu havas sian propran ideon, sian propran intereson kaj tio ne nepre kongruu kun la nia.

Nia respondeco estas helpi, instrui la grupestrojn kiel interesigi la membrojn. Ne devas temi nur pri kunven-gvidado, sed multe pli pri kunmeto de interesaj programoj, programoj je ĉies plaĉo !

Ni same pene zorgu ke la bazo, anstataŭ stagnu, do, malpliiĝu, restu kaj kresku ! Se ni bone gvidas la bazon, se ni sukcesas rikolti la fidon de la membraro, ili - la membroj - iĝos veraj vivaj propagandistoj pro persona entuziasmo.

Tre bele estas organizi studotagojn por lerni kiel defendi nin, por konstrui strategion (ho, kia simileco kun la tutmonda politiko, kiun ni tiel malŝatas !), sed al kio bone se poste la kerno, la bazo perdas interesiĝon ?

Prikonsiderante ĉion, me eĉ demandas min ĉu la de FEL organizitaj kadrokursoj sufiĉas, ĉu ili havas veran sencon, ĉu ilia enhavo ne devus esti plikompletigita cele al, aŭ prefere profite al la grupoj, cele kaj profite al la membroj, jes aŭ ne novaj. Kion fari por plaĉi al ili.

Ni ne perdu el la vido tiun gravan fakton kaj, eĉ se mi ie komprenas la ideon "eksteren" kaj eĉ subtenas ĝin, zorgu ke ambaŭ flankoj de la movado, tiel la interna kiel la ekstera, ricevu la atenton kiun ili ambaŭ meritas. Se ne, nia tuta penado servos al ne multe.

Josuperter'

---

El la proverbaro (ensendis F. Roose)

| | |
|---|---|
| Se okulo ne vidas, koro ne avidas | Wat het oog niet ziet, deert het hart nie |
| Ilo el oro taŭgas por ĉiu laboro | Voor geld is alles te koop |
| Pli efike ol bato pelas malsato | Honger is een scherp zwaard. |
| Ĉefaferoj restu ĉefaferoj | Wat het zwaarst is moet het zwaarst wegen. |

# VLAAMSE ESPERANTOBOND
# FLANDRA ESPERANTO-LIGO

F.E.L.

## KADROKURSOJ 1982-1983

| | | | | |
|---|---|---|---|---|
| Sabaton 23 10 1982 | 09.00 - 10.00 h. | mallonga ekzameneto pri lingvokono | | |
| | 10.00 - 16.00 h. | PAROLTEKNIKOJ fare de Paul Peeraerts<br>Publikaj paroladoj | | |
| " 27 11 1982 | 09.00 - 10.00 h. | ekzameneto (se necese) | | |
| | 10.00 - 16.00 h. | LITERATURO | Christian Declerck | |
| " 18 12 1982 | 09.00 - 10.00 h. | ekz. se necese | | |
| | 10.00 - 16.00 h. | INSTRUTEKNIKOJ | Emiel Van Damme | |
| " 22 01 1983 | 09.00 - 10.00 h. | ekz. se necese | | |
| | 10.00 - 16.00 h. | KUNVEN- kaj<br>DEBAT-TEKNIKOJ | Paul Peeraerts | |
| Ø " 05 03 1983 | 09.00 - 10.00 h. | ekz. se necese | | |
| | 10.00 - 16.00 h. | HISTORIO | Fernand Roose | |
| " 26 03 1983 | 09.00 - 10.00 h. | ekz. se necese | | |
| | 10.00 - 16.00 h. | KOMUNIKADO<br>Inform/propagand-teknikoj | Anne Tilmont | |
| " 23 04 1983 | same kiel 26 03 1983 | | | |

Ø Pro la Semajno de Internacia Amikeco, la kursoj ne povas okazi, nek je 19 02 1983, nek je 26 02 1983.

Por pliaj informoj : ESPERANTO-CENTRO, Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN
André STAES
Jan BOVENDEERD

La kursoj okazos en ESPERANTO kaj estas alireblaj al ĉiu.